


# BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE  
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



No 11.

Februaro 1954

Aperas laŭbezone

## S E N T O F E S T A .

Al s-anino Ŝupichová  
okaze de ŝia 70jara jubileo.

Mi foliumas en volum' malnova  
kaj jen min kaptas tuj unua paĝ'.  
... kaj inter tiuj, kiuj kun kuraĝ'  
portis la torĉon, estis Ŝupichová.

Ĉu vin ne venkas ia sento festa,  
kiam vi legas pri escepta hom'?  
Do Ŝupichová, tiel sonas nom'  
de l'heroino, tamen tre modesta.

Kaj mi konfesas: Al mi faras ĝojon,  
ke en movado rolis eĉ virin'.  
Ja Ŝupichová estis, kiu sin  
konscie donis por lumigi vojon.  
Eli Urbanová

LA POETO "AMIKO" ne estas Majstro!  
Dum la unuaj jaroj de nia lingvo aperis en  
la gazeto "La Esperantisto" kaj en la  
unuaj jarkolektoj de "Lingvo Internacia"  
granda nombro da originalaj Esperanto-  
poemoj subskribitaj per la plumnomo  
"Amiko". En Esperanto de UEA de novembro  
1953 esprimas M.C. Butler la supozon, ke  
"tre verŝajne - preskaŭ certe" tiuj poemoj  
devenas de Zamenhof. Paul Nylén, kiu tiam  
dum kelkaj jaroj redaktis la "L.I.",  
konfirmis al ni, ke ne la Majstro, sed  
A. Kofman el Odeso estis aŭtoro de tiuj  
poemoj. Al samideano Nylén ni ŝuldas  
dankon ankaŭ por la atentigo, ke tiu  
klarigo aperis jam sur paĝo 123 de la  
verko de K.R.C. Sturmer "El notlibro de  
praktika esperantisto", kiu aperis en  
Budapest 1934.

Karel Havlíček Borovský: BAPTO DE CARO VLADIMIR. Legendo el rusa historio. El la  
ĉeĥa esperantigis Dro. Tomáš Pumpr. Eldonis J. Régulo Pérez, La Laguna, Kanariaj  
insuloj 1953, kiel duan libron de la belliteratura serio "Stafeto". Kun 104  
ilustraĵoj de ĉeĥa Nacia Artisto Josef Lada, Trikolora kovrilo de Jack Hartley.  
102 pĝ 18x22 cm. Prezo ne notita. - Kun koro batante pro ĝojo ni prenas en la  
manojn tiun-ĉi volumon, brilan laŭ ekstero kaj laŭ enhavo. La esperantaj versoj  
de Pumpr tintas same gaje kiel tiuj de la originalo. Multaj ĉeĥoj scias parkere  
grandajn partojn de tiu ĉi poemo famiĝinta en ĉeĥaj landoj. Ili kun ĝuo kaj  
admiro sekvas fidelecon de la traduko eĉ en la plej malfacilaj partoj de la  
verko. Kompletega komentario faras la eldonaĵon ankoraŭ pli valora. La libro  
enhavas amason da bildoj de nia populara Lada. La bela kovrilo devenas de angla  
grafikisto. Bonega papero kaj la tuta aranĝo de la libro pruvigas, ke la klera  
eldonanto ŝparis neniaflanke, por prezenti verkon eminentan. Restas nur la pro-  
blemo, kiel ĝin akiri por nia lando, kie ĝi trovus sennombrajn ardajn interesu-  
lojn. Mi konfesas, ke ni ne scias tiun problemon solvi en nia senpovo. O.G.

De mano al mano iris la unuaj ekzempleroj de ĉi tiu libro dum la kunveno de  
Esperantista Klubo en Praha. Dro. Pumpr, la tradukinto kiu tiuvespere (20.I.)  
prezentis ampleksan komenton kaj rakontis multajn ĝis nun ne konatajn  
detalojn rikoltis entuziasman aplaŭdon kaj dankon. red.

SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO aranĝos ĉi-jare de la 27/7 ĝis 7/8 en DOKSY  
esperantajn kursojn. Ĉe-kurso por la komencantoj, progresiga, konversacia,  
oratora kaj faka seminario. Krome okazos kulturaj kaj amuzaj entreprenoj kaj  
ekskursoj. Pluaj informoj en venonta numero de la Bulteno. Adreso:  
Letní kolej esperanta, Doksy u Máchova jezera, Moskevská 453.

ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA kunvenas ĉiumerkrede je la 20a horo en Praha II, Ve Smečkách 26. Jen la programo de venontaj kunvenoj:

- 3.II.1954 G L O R A J M O M E N T O J. En granda teatra salono. Artisma vespero. Rolas Eva Suchardová kaj la kolektivo.
- 10.II. FILMA VESPERO. Aranĝas A. Slanina kaj J. Vítek
- 17.II. KRISTNASKO EN LA SOMERO. Parolos J. Šustr
- 24.II. ĜENERALA KUNVENO. Raportoj pri la funkciado, elektoj de nova komitato kaj planoj por la estonteco.
- 3.III. Eltiroj el originala brahmana letero ..... Jan Zemek

EL NIA MOVADO: MOST. Nikolaa vespero estis aranĝita en eksterurba arbara restoracio. Partoprenis pli ol 20 (rim. de red.: Venonte diru precizan nombron) gesamideanoj el Most, krome gastoj el Karlovy Vary kaj Lanžhot. Ludis sesmembra ĵazorkestro kaj noktomeze disdonacis Nikolao grandan korbon da donacoj. Dum intervaloj prezentis sian arton du sorĉistoj: Kočí kaj Uhlík. Samideano Svačina el Lanžhot montris al la juna instruistaro sian instrumentodon.

OSTRAVA-ZÁBŘEH. Sukcese finiĝis kursoj por la komencantoj kaj por progresintoj, kiuj havis po 18 kaj 20 partoprenintoj. Novaj kursoj okazos ĉiumerkrede en Uzina Klubo Ostrava 10 en Zámek. Klubaj kunvenoj okazas ĉiun unuan lundon en la monato en Tramista domo Ostrava 1. Istruas Vladimír Slaný.

REGIONA LABORKONFERENCO en FRÝDEK-MÍSTEK okazos la 28an de marto 1954 zorge de nova loka Esperantista Klubo fako de uzina klubo de loka ŝpinafabriko.

HEROLDO DE ESPERANTO. Lastatempe nia poŝto ne plu permesas eniron de tiu gazeto kaj ni ne povas diri, ĉu la cirkonstanco ŝanĝiĝos. Se ekzistos la ebleco, ni informos ĝustatempe niajn aktivulojn pri la kondiĉoj.

40a JUBILEA KONGRESO DE JAPANAJ ESPERANTISTOJ, kiu okazis dum pasinta somero en Okajama dankis por nia salutletero sendita zorge de s-ano Bartošík kaj skribas: Kun granda ĝojo ni informas al vi, ke nia kongreso havis ĉirkaŭ 300 partoprenantojn, el diversaj partoj de nia lando. Estis okazigita en gaja interamikiĝa atmosfero dum tri tagoj, kaj estis sufiĉe sukcesplena kaj memorinda. - Ni konstatas, ke Via mesaĝo donis grandan impreson al ĉiuj ĉeestantoj, kiu helpas sendube instigi japanajn samideanojn al pli vigla agado en estonteco. Bonvolu akcepti nian dankon kaj bondeziron al Viaj amikoj. Samideane Via - La Estraro de la 40 Japana Kongreso de Esperantistoj kaj D-ro Hiedeo Jagi, la prezidanto de la kongreso.

ĈEĤA LIBRO MENCIAS ESPERANTON. Ni estis agrable tuŝitaj, trovinte, ke nova ĉeĥa verko parolas pri esperanto, ne insultante ĝin. - Zdeněk Šarbach en sia verko pri vivo de sovetaĵ blinduloj "Nerompitaj homoj", kiun li verkis laŭ sovetaĵ fontoj kaj kiu aperis pasintjare en la eldonejo de la Asocio de Ĉeĥoslovaka-soveta amikeco (Nezlovní lidé, obrazy ze života a práce sovětských slepců. Podle sovětských pramenů zpracoval Z.Š. Praha 1952. Svět sovětů) parolas sur pĝ 63 en la ĉapitro "Blinda vojaĝanto kaj poeto" pri la blinda rusa esperantisto Vasili Eroŝenko, longe vivinta en Ĉinio. Ni legas tie, ke Eroŝenko regas la lingvojn japanan, ĉinan kaj Esperanton preskaŭ kiel sian gepatran lingvon rusan, ke li instruis Esperanton en la universitato de Peking. Laŭ Šarbach estas lia vivsorto tiel mirinda, ke ĝi ŝajnis ne kredebla kiam la poeto rakontis pri ĝi al la partoprenantoj de la E-kongreso en Vieno en 1924. - Ni aldonas, ke E. verŝajne daŭras vivi en fora Oriento. En japanaj E. gazetoj oni proponas nun lian novan verkon "Rakontoj de velkinta folio".

POR EBLIGI PLUAN ELDONADON DE NIA BULTENO donacis ciklostilan paperon: Rýznar - Čtyřicet Lánů, Staňura - Radvanice, nekonata samideano el Trenčín, Echtner - Praha, Douda - Nový Bor, E.K.Strakonice (Blažek), MUDr. Vaněk - Nová Role, Forman - Praha. Mondonacoj: Nozar - Poděbrady Kčs 20.- prof. Filip Přibyslav 30.-, Lička Ostrava 18.- Esperanto-Servo - České Budějovice 10. Koran dankon al ĉiuj! - - - - -

Eldonas E.K. en Praha. Eldonnombro de ĉi tiu numero: 800. Venonta numero aperos fine de februaro/komence de marto. Adreso: J.Šustr, Praha I, Dlouhá 10